

## ESPERANTISTO

## ESPERANTYSTA POLSKI

MONATA REVUO DE ESPERANTISTA MOVADO EN POLUJO KAJ EKSTERLANDE  
MIESIĘCZNY PRZEGLĄD RUCHU ESPERANCKIEGO W POLSCE I ZAGRANICĄ

ELDONANTO POLLANDA ESPERANTO-DELEGITARO.  
WYDAWCA

REDAKTANTOJ PROF. DR. ODO BUJWID — TAD. HODAKOWSKI  
REDAKTORZY

APERAS LA 1-an DE CIU MONATO. REDAKCIAN MATERIALON ONI PETAS SENDI  
ĜIS LA 20-a DE CIU MONATO.

## LA EKZAMENO.

Mi songis strangan songon. Mi songis, ke mi devis fari ekzamenon. Ekzamenon pri la ĝardenkulturo. Praktikan ekzamenon. Mi estis en ĝardeno. Bela estis la ĝardeno, sed delonge nezorgita. Kaj la tasko, kiun oni donis al mi, estis: purigi la ĝardenon, fari el tiu senorda sovaĝejo lokon de beleco, igi la florojn kreski kaj flori, kaj la malbonherbojn forŝiri kaj forĵeti.

Mi devis plenumi la taskon, kiel mi kapablis. Kaj konsternite mi demandis min mem: kiuj kreskaĵoj restu, kaj kiujn mi forŝiru? Mi rigardis ĉirkaŭen. Mi vidis florojn, kiujn mi mem estis seminta, kaj florojn, kies semojn nekonsolataj ventoj alportis kaj la nigra tero, akceptis kaj nutris. Kaj ŝajnis al mi, ke la plej logika solvo estos: lasi en la tero kaj prizorgi tion, kion mi mem estis seminta, kaj ĉion alian forŝiri.

Sed ĉu prava mi estis? Dabo min mordis. Mi demandis konsilon de maljuna ĝardenisto, kiu fosis la teron en la ĝardeno. Li levis al mi sian vizaĝon, plenan je sulkoj, similan al plugita tero. Li rigardis min per siaj profundaj okuloj — kaj malrapide movis la kapon per nea gesto. „Ne — li diris. — Ne tiel ordigu la ĝardenon. Kies manoj semis la kreskaĵojn — ne demandu. Ne tio gravas. Sed rigardu ĉirkaŭen kaj peru kompreni, kion intencis la mastro

de la ĝardeno, kiam li fondis tiun ĉi belan ĝardenon. Tion, kio konformas al lia plano, lasu kaj flegu. Aliajn herbojn, se ili eĉ alten levas sin fiere, ŝiru for: ne estas por ili loko ĉi tie“.

En ĉi tiu momento mi vekigis. Stranga songo — mi pensis — kaj stranga ekzameno. Kion signifis tiu ĝardeno, plena je floroj de diversa deveno, kion signifis la tasko, kiun oni donis al mi, kaj la konsiloj de la ĝardenisto? Kaj la ekzameno? Kial? Diversaj povus esti la respondoj. Nia tuta vivo estas ja senĉesa provado de niaj fortoj. Kaj la ĝardeno? Ĉiu el ni havas en la animo ĝardenon, en kiu diversaj ventoj semas, kiun diversaj pluvoj inundas kaj diversaj hajloj skurĝas. Kaj la granda ekzameno de nia vivo estas: teni ĝin en ordo. Ni ne lasu, ke la malbonherboj okupu la lokon de la noblaj kreskaĵoj. Kaj ni ne demandu, ĉu tiu aŭ alia floreto plaĉas al nia gusto, ĉar malmultaj el ni estas kompetentaj pri la ĝardenkulturo. Ni nur zorgu, ĉu la maniero, laŭ kiu ni aranĝas nian ĝardenon, konformas al la plano, laŭ kiu ĝi estis fondita, al la celo, por kiu ĝi ekzistas.

Kaj alia povas esti klarigo de tiu songo. Ni ĉiuj estas kvazaŭ kreskaĵoj. Brilajn kolorojn ni havas iafaĵe sed ofte ni estas nur malbonherboj de vanteco kaj ambicio. Momente ni eble povas fi-

eri — sed ve al ni, kiam venas la ĝardenisto, ĉar li elŝiros nin el la tero kaj jetos for, tien, kie ne estas la aromo de rozoj, sed la odoro de putrado.

Kaj multajn aliajn klarigojn oni povus trovi por tiu sonĝo. Kiu ŝatas la sonĝojn — pripensu. Kaj se iu el vi volas

konsideri tiun verdan ĝardenon, kiel la arenon de la esperanta mondo, pensu ankaŭ, kiam ordon ni gardu en ĝi, por ke kontenta estu tiu, kiu ĝin fondis, kaj por ke ĝi floru je la eterna beno de l' homaro.

Lidja Zameuhof.

## NIA DUDEKSESA EN STOKHOLMO.

(Fino).

Kaj nun, kiam la Kongreso estas jam oficiale malfermita, la gekongresanoj kun flama fervoro partoprenas ĉiujn aranĝojn de la Kongreso. Precipe fervoregas polaj ĝesamideanoj. Ili ja restos nur dum duono de la Kongreso, do ili devas kun duobla energio trapenetri ĉion.

Interkonatiĝa vespero en Granda Hotelo. Jen io grandioza! Belegaj salonoj, luksegaj. Amasegoj da homoj svarmas. Impreso eksterordinara.

Ĉu estis eble tie interkonatiĝi, ekkoni novan samideanon? Mi treege dubas. Eĉ malnovajn kongresajn ĝeamikojn estis malfacile trovi. Du mil esperantistoj ja povus plenigi tutan urbeton. Tie ĉi en la salonegoj de Granda Hotelo ili plenigis ĉion ĝis la lasta loko en la spaco. Tre moviĝemaj ili plejparte senĉese vagadis de unu salonego al alia, formante unu grandegan, ondantan amason.

Sed jen mi ekvidas sur la firmamento stelon, delonge malaperintan de nia pola esperanta ĉielo. Estas la ĉiam juna kaj ĉiam ankoraŭ korkrianta Grenkamp. Kompreneble, jam kun svedino. Li bonvolas esprimi sian senmezuran ĝojon pro la renkonto kaj kisas eĉ min. Iom malpli arde, ol oni povis atendi de aŭtoro de „Krioj de l' koro“, sed ĉiaokaze sufiĉe laŭte kaj tute senkaŝe, kiel decas al ĉefredaktoro de „Nia gazeto“.

Li prezentas min al sia akompanantino, dirante jene: „Jen estas la konata fripono Joŝo, havanta tri edzinojn kaj dekdu infanojn“. Certe nur la deziro prezenti min kiel malpli kapablan instigis amikon Grenkamp rekomendi min tiel. Mi do indulĝe ne protestis kontraŭ la improvizitaj neĝustajtoj.

Sur la balkono, en diskreta mallumo, nacimiksitaĵoj admiris la belaĵojn de nokta Stokholmo. La gardanto de nacia pureco, s-ro Walther, certe ne vidis tiujn parojn. Sed, se eĉ li ilin vidus, li devus — kontraŭ la ordono — mallevi la manojn...

Dimanĉa tago prezentis al la kongresanoj pluajn punktojn de la programo.

Matene diservoj kun Esperanto-predikoj. Je 10-a matene kunsidis la komitato de UEA ie alte kaj profunde en la kongresa domo. Estis tre konfidenca kunsido. Neniu krom la komitatanoj estis al lasata.

Dum la ĉefuloj pace batalis, la Esperanta popolo amase ekskursis al Saltsjöbaden, belega ripozloko. Oni veturis per kelkaj ŝipoj, per vagonaro aŭ eĉ per aŭtomobiloj.

Vespere bonega koncerto kaj denove vagado tra la admirinda Stokholmo.

Sekvontan tagon plenigis multaj kunsidoj, malfermo de Somera Universitato, teatra Esperanta prezentado ktp. Fortan impreson faris la oficiala akcepto en la urba domo. La urbestro de Stokholm s-ro Tengdahl gastame akceptis la tutan gekongresanaron, faris belan salutparoladon kaj invitis poste ĉiujn al abunde ŝarĝitaj tabloj. La esperantistaro ne rifuzis ankaŭ tiun inviton kaj obeeme formanĝis kaj fortrinkis ĉion.

### LA DRAMA KUNSIDO.

Marde, la 7-an de aŭgusto, daŭris diversaj fakaj kunsidoj.

Plej grandan intereson altiris la labor-kunsido de UEA. Ja unuan fojon UEA aperis antaŭ la Esperantistaro kiel sola gvidanta institucio de la Esperantomovado.

Bedaŭrinde, tiu unua apero ne estis tro feliĉa. La Esperantistaro eksciis pri rezignoj, rezultantaj de la konfidenca komitata kunsido. La popolo ne estis informita pri la detaloj de la kunsido. Ekvarmiĝis la atmosfero. La kunsido daŭris malgraŭ la formala fino. Oni disiris kun pezaj pensoj kaj maltrankvilaj koroj.

Laŭ skriba postulo de aro da Esperantistoj estis poste anoncita por sekvonta tago daŭrigo de la kunveno. Bedaŭrinde, polaj ĝesamideanoj devis la saman tagon forveturi jam per sia ŝipo. Tial ili kun malagrablaj sentoj forlasis la Kongreson. Ili partoprenis ja nur la duonon de la Kongreso kaj estis — pro la vojaĝ-

plano de la ŝipo — devigitaj forlasi la Kongreson ĝuste en la momento, kiam gravaj aferoj estis decidotaj.

Vespere antaŭ la forveturo oni vizitis grandamase la subĉielan muzeon kaj popolparkon „Skansen“. Belegaj estis la popoldancoj, tie prezentitaj. Agrabla estis la muziko. Allogaj la popolkabanoj, objektoj de la muzeo. Tiuj kabanoj estis fervore vizitataj, parte eĉ tro fervore. Kiel asertis poste la gaja ŝipgazeto, eldonata sur la ferdeko de pola ŝipo „Warszawa“, post tiu vizitado la nova prezidanto de UEA ĝen. Bastien ordonis fermi „Skansen'on“ por malebligi pluan uzadon de kabanoj, kiel kisejoj. La ĉefa kulpulo Grenkamp estis eĉ — laŭ aserto de la sama gazeto — severe punita...

**Grava alvoko!**

## POLLANDO INVITAS VIN!

okaze de la XIII-a Internacia Skolta Tendaro de S.E.L. en la j. 1935.

Skolta voĉo en akordo  
Vokas tra la horizont',  
Fratojn ligas al la ordo  
En la Esperanta front',  
Sub la verda stelstandardo  
Unulingva la komand',  
La kuraĝa avangardo  
Venkas jam en ĉiu land'.

„**Pola Skolta Asocio**, rekonante Esperanton por la frataj interrilatoj de la skoltoj de la tuta mondo, decidis inviti **Skoltan Esperantistan Ligon por tendari** (julie 11—24. 1935.) en Pollando. La tendaron aranĝos **Pola Skolta Asocio** en la kadroj de **Jubilea Nacia Skolta Jambo-reo** okaze de 25-jara ekzisto de Pola Skoltaro. Oni esperas amasigi pli ol **30.000** ĝeskoltojn el Pollando kaj eksterlando. La Tendaro okazos en ĉirkaŭaĵo de **Spała** (elb. Spaŭa; somera rezidejo de la Prezidanto de Pola Respubliko) ĉe rivero **Pilica**“.

Ĉi supra sciigo certe multe ĝojigos la tutmondan Skoltfrataron. Sed ankaŭ la Esperantistaro ne malpli ĝojos pro pligrandiĝo de sia granda familio. Ĉiuj konsciaj samideanoj tre bone scias, kiel grava estas propaĝando de nia ideo inter junularo. Jen Skoltismo posedas pli ol **2,000.000** da ĝeknaboj. Do, se ni kapablos interesigi tiun ĉi multnombran ĝejunularon al Esperanto, kies interesigon oni jam sukcesis atingi en multaj landoj kaj en Hungarujo, Belgujo, Litovujo, Esperanto estas oficiale rekonata de Skolt-asocioj, tiam ni povos pli forte

## REVENO.

Ree eknaĝis la ŝipo „Warszawa“, forportante la polan kongresanaron. Ree la kunestado ligis pli proksime ĉiujn.

Ni memoris tamen pri tiuj feliĉuloj, kiuj restis ankoraŭ en la kongresurbo. Ne povante partopreni la duan parton de la Kongreso, ni aranĝis sur la ŝipo la daŭrigon de la Kongreso. Ne nur la daŭrigon de la amuza parto, sed ankaŭ de la labora parto. Kaj ni nur bedaŭris, ke iuj el la Stokholma kongreso ne povas ĉeesti por preni ekzemplon, kiel oni povas kaj devas pritrakti eĉ plej seriozajn aferojn.

Oni revenis hejmen kun freŝaj fortoj por daŭrigi la Esperanto-laboron en Zamenhofa naskolando.

**J. Ŝapiro.**

**Bonvolu nepre prizorgi!**

enradikiĝi kaj fundamentiĝi sur la vasta mondo. Kiel vi scias la skolta movado ĉie bone prosperas kaj **nepre** bezonas ilon por interkompreniĝi — fratiĝi. Ne mirinde do ankaŭ, ke oni fondis Skoltan Esp. Ligon (1918.), kiu per siaj ĉiujaraj **tendaroj** pravas la realigon de la frateco kaj interkompreno pere de Esperanto. Jen la Skoltismo estas parenccela kun Esp.-movado. Zamenhof ja ankaŭ celis, ke per Esperanto ĉiu homo estu frato. Do ĉu estas pli taŭga movado, kiun ni interesigu al Esperanto ol la skolta. La **Skoltaro konsistas el junularo** kaj, kiel ni scias, al la **junularo apartenas la estonteco** kaj la venonta forto de l' definitiva venko de Esperanto. La **junularo estas la avangardo** de tiu ĉi renoviĝa movado, kiu povas porti torĉon de nia idealo per juneca fervoro. Do, se la skoltaj rondoj estas interesitaj al Esperanto, nia devo estas ilian **interesiĝon fervorigadi kaj daŭrigi.**

La plej urĝa afero por ni nun estas la afero de nia propaĝando antaŭ kaj dum la venonta Internacia S.E.L. Tendaro. La tendaro ja celos pruvi, ke Esperanto vere taŭgas, kiel interkomprenigilo, inter diversnaciaj skoltoj kaj la invitanta **Pola Skolta Asocio** certe atentente observos ĝin, por raportii pri ĝi al la alilanda Skoltaro kaj unuavice al la **Londona Internacia Skolta Oficejo**, de kiu dependas la oficialigo de Esperanto **por la tutmonda skoltaro.**

Ni do turnas nin al ĉiuj U. E. A. de-

legitoj, S. E. L. reprezentantoj, societoj, grupoj, ĉiuspecaj esp.-organizaĵoj kaj ankaŭ al unuopaj gesamideanoj, petante ilin, ke ili helpu nian laboron, en komuna intereso, vaste propagandi nian tendaron inter vialokaj skolt-grupoj kaj instigu ilin, ke ili reprezentu sin simile, kiel okaze de aliaj internaciaj tendaroj. **Aranĝu Esp.-kursojn** por geskoltoj (laŭeble senpagajn, ĉar la ĝejunularo ĝenerale estas malriĉa), proponu esti **tradukanto** de Esp.-komunikaĵoj el Esperanto en nacia lingvo. **Sendu al ni adresojn** de vialanda skoltasocio, ligo, trupo kaj skoltgazetoj, por ke ni povu kun ili ankaŭ senpere interrilatiĝi.

Karaj gesamideanoj! eluzu okazon kaj laŭeble **tuj komencu preparlaborojn**. Jen la vintra sezono estas la plej taŭga por propagand-laboro. Partopreno en la tendaro estas mirinde malalta (proksimume 2.-sv. fr. potaĝe). Atentigu do geskoltojn pri la malmultekosta tendarado kaj vi tiom pli facile atingos dezirindan sukceson.

**Kunlaboru laŭeble ankaŭ finance** per sendo de unu, du respondkuponoj por preparaj laboroj kaj propaganda kaso. **Fondu konkurs-premiojn** (ekz. por interkorespondado k. t. p. aŭ dum la tendaro). Ebligu al vialandaj skoltoj travivi

en frata rondo kelkajn agrablajn tagojn sub samaj tendoj. **Sendu al ni sugestojn, proponojn** kiamaniere ni povu sukcese interesigi vialokajn skolt-grupojn al S.E.L. Tendaro. **Prizorgu**, ke ni ricevu el vialando, loko **korespondantojn-skoltojn**. **Kaj vi bonvolu sendi al ni almenaŭ poŝtkarton** kun la kuraĝigo kaj sciigo pri intereso al S. E. L. Tendaro.

Interesitoj bonvolu peti de ni precizajn informojn. Do ni petas ĉiun skolton kaj eks-skolton, kiu intencas viziti lutilon de Esperanto kaj intencas ĉeesti la **tendaron de geskoltoj esperantistaj**, **sciigi nin tuj**, por ke ni povu al ili regule sendi ĉiujn aperontajn komunikaĵojn.

Ekonomia stato estas ĝenerale malbona, tamen kun kredo je helpemo de nia samideanaro kaj kun la maksimumo „**En kunlaboro estas forto**“ ni esperas venki malfacilaĵojn.

Reciproka helpo kaj kunlaboro de nia kaj via flankoj povas esti utila kaj efika por organizado de la junularo en la Esp.-movado sur la tereno internacia.

**Helpu la tujan praktikan utiligon de la lingvo per energia instigado! Anoncu vin tuj!**

Emil Mayer, S. E. L. repr. por Pollando.  
**Kraków, Lelewela Nr. 9.**

## LA LIBROTAGO.

**Pensoj okaze de la 15-a de decembro 1934.**

Antaŭ kelkaj jaroj realiĝis en Esperantujo bela kaj ankaŭ bona ideo: Ĉiujare oni dediĉas al la esperanta libro du honorajn tagojn. Vere belega ideo, kvankam estus preferinde, ne bezoni speciale atentigi la esperantistaron pri la esp. libro. Sed...

La Librotago ne estus tio, kio ĝi devas esti, se nur ĝi servus, kiel rimedo de klientarvarbado por niaj eldonejoj. Ankaŭ tio estas grava, kvankam nia suspektemeco en tiaj intencoj nur vidas atakon je niaj maldikaj monuoj. Sed tiun negocan flankon mildigas la fakto, ke la tagoj de la esperanta libro kunokazas kun la datrevenoj de la naskiĝ- kaj mortotago de nia Majstro. Estas tio la 15-a de decembro kaj la 14-a de aprilo.

La korpo de D-ro Zamenhof jam ne estas, sed lia spirito vivas, ekvivas ĉiam denove, kiam esperantistoj renkontiĝas kaj ekinterparolas; kiam esperantisto legas esperantan libron. En ĉiu esperanta libro vivas la spirito de D-ro Zamenhof,

vivas apud la spirito de la geniulo Gutenberg kaj apud la spirito de la aŭtoro. Tian libron legi, signifas revivigi noblajn spiritojn, tian libron aĉeti, signifas multvalorajn trezorojn forŝiri el la ĝenerala forgesemeco, el la indiferenta bagateleco. En tio ĝuste kaŝas sin la mistero de la esperanta libro, kaj jen la klarigo: Librotago estas ofertago por tiu libro.

La tagon de la libro ni devas soleni kiel festtagon de la esperanta spirito; soleni kune kun ĉiuj, kiuj sin ankaŭ nomas esperantistoj, egale kie ili loĝas. Kuna-parteneco de la spirito ne estas ja disigebla per landlimoj.

Ĝenerale oni diras, ke libro estas agrabla kaj fidela amiko de la homo. Sed por ni estas esperanta libro pli ol nur amiko, pli ol nur ĝoj- kaj plezurdonanto. Esperanta libro estas por ni ofte la plej ebla rimedo por resti en kontakto kun la esperantismo; estis ofte nektarŝpruciganta fonto, refreŝigante batallacajn a-

nojn de nia ideo, donante al ili kuraĝon kaj persiston. Krome respegulas sin en la esperanta libro la historio de la esperantismo; simpla kaj modesta libreto estis, kiu en la jaro 1887 sciigis pri la naskiĝo de Esperanto. Kaj hodiaŭ? Libro-katalogoj donas imponan respondon.

Pro tio ni volas ĉiam, kiam eble, sed hodiaŭ nepre, havigi al ni esperantan libron: ankaŭ ni klopodos donaci ĝin al aliaj. Tia donaco, se bone elektita, ha-

vas valoron por generacioj. Certe ĝi estos pli dankeme akceptita ol aliaj senutilaj donacoj. Krome ĉiu bona esperanta libro estas kvazaŭ ĉiama admono al fideleco kaj sincereco rilate al la esperantismo. Fine esperanta libro ideale taŭgas por disvastigi gepatran nacian literaturon. Do faru la elekton! La libro-katalogoj atendas!

**Jerzy Weis.**

**DR. LEON ZAMENHOF.**

## TROABUNDO DE INTELIGENTULARO.

Ni permesas al ni transdoni al nia est. legantaro jenan artikolon de la mortinta Frato de nia Majstro, dro Leono Zamenhof, tradukitan el pola lingvo de dro Dreher. La artikolo aperis kelkajn tagojn antaŭ la morto de la Aŭtoro en la semajna gazeto „Lektura“ (Warszawa).

**La Red.**

La gazetaro trumpetis alarmon. Subite oni rimarkis, ke la lando estas minacata de superakvumo de la inteligentularo, sekve oni devas kiel eble plej frue fari diĝon al ĝia danĝera pliiĝo! Ni estas vere feliĉa generacio! Kion do ni ne posedas en troabundeco? Ĝis nun oni krediĝadis nin, ke ni havas tro da produktado, teknikaj akiraĵoj kaj ĉiaj aliaj kulturbonaĵoj, ne esceptante eĉ nutrajajn artiklojn. Kaj ien ni sciigas, ke ni estas trosaturitaj eĉ de la inteligentularo!

Verŝajne morgaŭ dislantiĝos nova alarmo pro troo da lernejoj, klereco ktp. Feliĉe, ĉiuj ĉi S. O. S.-oj malakrigis nian impresiĝemon. ĉar alikaze ni devus rezigni ĉion, kion la homaro estas akirinta kun tiom da penado en la daŭro de jarmiloj!

Kaj tamen estas multe da praveco en tiu avertado pri la inteligentularo. Ĝia situacio estas katastrofa, sendube. Sed ĉu nur pro ĝia troabundeco?

Penindas serioze pripensi tion, se ni deziras vere plibonigi iom la kreiĝintan situacion.

Jam pasis la tempoj, kiam la inteligentularo, paŝante ĉe l' fronto de la progreso, estis akiranta la honoran nomon de spirita elito, kiam Voltaire povis nomi ĝin floro kreskinta sur modesta trunketo. La atmosfero, en kiu tiu floro nun estas vivanta, estas esence ŝanĝita. La iam malgrandeta grupo de la spirita elito estas kreskinta kiel potenca armeo de profesiaj inteligentuloj. Oni komen-

cis perfortan bredadon de tiuj floroj, ne tre zorgante pri konvena fertiliĝo de la grundo. Do ne estas mireble, ke sur malbone flegita trunketo nepre aperis kreaĵo parazita. Sufiĉas jam supraĵeca trarigardo de la vicoj de nia hodiaŭa profesia inteligentularo, por konfirmi tiun malgajigan konkludon, plentute, bedaŭrinde.

Kio estas hodiaŭ la kuracisto, pri kiu tiom fiere esprimis sin Gladstone, ke li estas destinita gvidi la sorton de popoloj? Eta, nenisignifa estaĵo, kuranta post la monero kaj forgesanta, pro la batalo de l' vivo, ke li estas reprezentanto de l' scienco, kiu proklamas la gloriajn signalparolojn pri sinfordono al la bono de la malsanulo kaj de la socio! Ĉu li tre ofte vokas helpon, por la milionaj amasoj fariĝintaj viktimo de mizero kaj infektaj malsanoj?

Kaj la profesiaj jurdefendistoj? Ĉu redaktante kodojn, defenante la interesojn de l' socio ili efektive gvidas sian agadon laŭ la principoj solaj de gardado al moralo kaj vero?

Ĉu pli bone estas pri la grandega armeo de la instruistaro, al kiu estas konfidita gvidado de la junularo la vivon eniranta? Ĉu ĝi plenumas sian devon konforme al sia respondeca misio? Ĉu ĝi malmis iam vigle protesti kontraŭ venenado de la animoj de la juna generacio?

Kaj tiu grandega plimulto dekorita per belaj sciencaj titoloj? Ĉu ĝi efektive gardas la eternan fajron de l' sendependa scienco? Ĉu ne al ĝi dankon grandmezure ŝuldas la homaro pro sia nuna malvenko? Ĉu ne ĝi, kiu estas ĉiam preta subteni per sia serviste - humilaĉa scienco ĉion, kio imponas per sia forteco, ĉu eble ne ĝi, mi ripetas estas tiu, kiu estas kondukinta la hodiaŭan aferstaton ĝis absurdeco, sankciante ĉian perforton kiel la t. n. natu-



ran rajton de la plifortulo en la batalo de l' vivo?

Karakteriza, tute ne honora eco de la t. n. inteligentularo estas ties mal-konsekveneco pri la konvinkoj, manko de kredado je sia propra misio kaj sin-humiligado antaŭ la plifortulo. La historio estas, bedaŭrinde, plena de malgajigaj pruvoj, kiuj atestas, ke la tenton de sinhumiligado kontraŭstari ne povis eĉ individuoj, kiuj dum longaj jaroj ĝuis senliman konfidon de la socio. Kun abomeno kaj kun teruro ni tra-rigardas la ĉiutagan gazetaron, kie senideaj plum - ekvilibratoj aranĝadas kaprompajn turniradojn, transjetante sin kun rekordeca rapideco el unu idea vidpunkto al alia.

Senkonfesiaj disvastigantoj de dogmoj, ekzegezistoj sen personaj konvinkoj, serĉantoj de manĝaĵoj apud aŭtomatuloj ne sciantaj konformigi sin al la vivbezonoj — jen la „floraro“ de la hodiaŭa socio laŭ idea vidpunkto! Ĉu en tia atmosfero povas konservi sian sendependecon la areto de tiuj, kiuj penas defendi sin kontraŭ la perforto? Ĝi pereas plejparte jen kiel viktimoj de l' malsato, primokitaj de siaj „reale“ pensantaj kamaradoj, jen ĝi fariĝas „trunko disŝirita“, kiel diras Žeromski en sia verko „Homoj sen hejmo“ „kiu unuparte elstaras supren kaj aliparte estas klinita malsupren kun la ruinoj, kvazaŭ homestaĵo sur palison najlita“.

La plej dolorigan ekzemplon de plena degenero de la hodiaŭa inteligentularo donis al ni la III-a Regno, kiu irigis la servantan sinhumiligadon de siaj superaj klasoj ĝis rekorda hontindeco! Je la fiaj signalparoloj de la novaj estroj

de Germanujo ja la unuaj, kiuj donis sian jesan respondon, estis la reprezentantoj de l' scienco kaj de l' arto! La Bruna Libro ja enhavas elokventajn pri-skribojn, kiel fronte de la solenaj procesioj al la placoj, kie estis bruligotaj verkoj de l' spirito, estis paŝantaj rektoroj de universitatoj ronde-ĉirkaŭitaj de siaj profesoraroj... Kaj tiun fiaĵon, kiu ne trovas en la historio de l' homaro analagion ne hezitis aprobi dank' al sia morala aŭtoritato la kantinto de sublimaj idealoj, por kiuj li estis preta dronigi la tutan realon en „Dronigita Sonorilo“... Gerhardt Hauptmann!

Ĉu tia inteligentularo povas vekti fiercon en ia ajn nacio? Ĉu povas esencan utilon ĝui el ĝi la al ĝi konfidita socio? Kaj tamen ekzistas landoj, en kiuj la hitlerismo trovis simpatian eĥon en koro de ideparencaj fratoj — inteligentuloj!

Tian aferstaton ne antaŭvidis eĉ Rousseau, kiu lancis la signalparolon de batalado kontraŭ la inteligentularo, kiel la plej granda perfortanto kaj ekspluatanto de la popolo, kaj kiu antaŭdiris, ke venos tempo, en kiu la pli saĝaj generacioj preĝos al Dio, ke Li liberigu ilin de la klereco de niaj prapatroj!

La vojo irata de nia hodiaŭa inteligentularo estas nebuleca kaj danĝerplena. Grandegan parton de la respondeco pri la travivata de ni krizo portas niaj spiritaj gvidantoj. Sed mekanika redukto de la inteligentularo ne ŝanĝos la situacion. Plibonigo povas veni nur helpe de gardado de tiuj fragmentoj de la inteligentularo, kiuj baraktas hodiaŭ en senespera batalado por la sendependececo kaj la libereco de la spirito.

Trad. Dr. L. Dreher.



## SPORTO KAJ TURISMO



### Varbado de fremduloj per Esperanto.

De Karlo Gerber (Augsburg XI, Germ.).

La varboforto kaj efikspaco de naci-lingva teksto de gvidlibroj aŭ faldfolioj por fremduloj tie finiĝas, kie oni ne komprenas ĉi tiun lingvon. Tial la trafikoficejoj de urboj, provincoj kaj ŝtatoj aperigas ankaŭ fremdlingvajn gvidilojn. Pro la altaj kostoj ili ĝenerale lamiĝas je eldono de prospektoj en la plej disvastigitaj lingvoj — la angla, franca kaj germana. Sed per ĉi tiuj ne povas esti servataj la vojaĝantoj el la nordo, oriento kaj sudo de Eŭropo, kiuj ne

scipovas ĉi tiujn lingvojn. Uzebla provizoraĵo en la nuntempo kaj kredeble la plej bona solvo en la estonteco certe estas la eldono de prospektoj en Esperanto, la internacia trafiklingvo. Fakte jam aperis granda nombro da Esperanto - presajoj por vojaĝo kaj trafiko.

Kiam la Esperantistoj de urbo sukcesis per eldono de Esperanto - gvidilo, tiam ili fiere kaj ĝoje raportas pri sia sukceso en Esp. - gazetoj.

Poste multaj Esperantistoj de diver-

saj landoj postulas tiun ĉi prospekton ĉe la trafikoficejo aŭ de la grupestro de tiu ĉi urbo. La trafikasocioj de malgrandaj ŝtatoj (pro politikaj kialoj) plej ofte estas kontentaj kaj ĝojigitaj, ke per la disvastigo de la Esperanto - prospektoj la ekzisto, kulturo kaj vidindaĵoj de ilia hejmlando konatiĝas en la tutmondo. La fremdulvizio al urbo tamen apenaŭ aŭ eble tute ne plimultiĝos, se la Esperantistoj en la diversaj mondpartoj sendigas al si la gvidlibron sole pro tio, ke ĝia eldono ĵus estas anoncita. Fakulo por fremdultrafiko skribis al mi: „Mi ne povas konsenti al via iniciato, uzi Esperanton por fremdulvarbo. La provoj faritaj en N. (Germ.) senluziĝis, ĉar oni tie same kiel en B. (Germ.) devis konstati, ke informpetoj en Esperanto estas faritaj kaj Esperanto - prespektoj estas postulitaj sole por ricevi Esperanto - legaĵojn. Tiuj varbmetodoj ne kaŭzis favoran efikon al trafiko“.

Nepre devas esti provite, la gvidlibrojn kaj faldfoliojn enmaniĝi al tiuj Esperantistoj, kiuj antaŭ aŭ dum sia eksterlandvojaĝo volas informiĝi pri historio, kulturo kaj arto, pri belaĵoj de urbo kaj pejzaĝo, pri banejoj kaj sporto, pri metio kaj industrio, merkatoj kaj foiroj. Jen kelkaj proponoj!

En „Heroldo de Esperanto“, en „Esperanto“ kaj en ĉiu nacia Esperantogazeto devos esti aranĝata rubriko por „Vojaĝo kaj trafiko“, en kiu konstante la ĵus aperintaj fremdulgvidlibroj kaj — faldfolioj kun kompleta adreso de la eldonejo kaj ordigite laŭ landoj okulfrappe estu anoncataj kaj priskribataj. La Esperantistoj detenu sin, tuj sendigi al si amase la anoncintajn prospektojn por ne estigi la supre cititan opinion; „troa fervoro malutilas“. Al tiu, kiu volas

serioze pligrandigi sian geografian, kulturhistorian kaj praktikan scion per la legado de Esperanto - prospektoj, kompreneble ne estu malpermesate, peti ilin.

La redakcioj de Esperanto - gazetoj, la delegitoj de U. E. A. kaj la administracioj de la asocioj ĝenerale senpete ricevas la prospektojn. La trafikvartuloj de la landaj kaj provincaj ligoj kaj de la lokaj grupoj devas tuj kaj nepre postuli kelkajn ekzemplerojn, kiujn ili transdonu al siaj biblioteko, trafikoficejo kaj industria kaj komerca ĉambro. (Germana Esperanto - Asocio jam instalas trafikvartulojn). Antaŭ ol Esperantisto vojaĝas al eksterlandaj urboj, li povas ricevi de la trafikvartulo de sia loka grupo informojn pri la eldonitaj prospektoj de la vizitotaj urboj kaj poste postuli ilin je sia propra uzo. Kiam li estos alvenanta en la fremda urbo, li unue iru al la trafikoficejo, kie li prezentu sin kiel Esperantisto, danku pro la alsendo de la gvidfolio aŭ — libro kaj petu pluajn informojn. Tiel la oficejestro vidas antaŭ siaj okuloj la efektivan sukceson de la Esperanto - varbo. Kelkajn tagojn antaŭe la eksterlanda Esperantisto komuniku sian akuratan alvenon al la delegito de U. E. A. kaj al la prezidanto de la loka grupo, por ke ili proponu al li siajn servojn kaj kunvenigu la ĉesamideanojn je konversacio. Ĉe aranĝo de Esperanto - ekspozicio povas la trafikvartulo montri la kolektitajn gvidlibrojn kaj faldfoliojn al la publiko kaj evidente pruvi, ke Esperanto plifaciligas kaj akcelas la fremdultrafikon. Kiel la radio - vartuloj jam hodiaŭ povas registri riĉajn sukcesojn, tiel ankaŭ la laboremaj kaj persistemaj trafikvartuloj atingos sian celon. Organizo estas necesa! Eklaboru!

## JULJA ACKER, LA LVOVA PENTRISTINO.

Artmuzeo Lvova.. bildekspozicio. Sur la blankaj muroj de la halego kadritaj majstro-verkoj de l' peniko. Floroj abundaj je multkolorco, ora sunradio... rozkoloraj nubetoj naĝantaj melankolie sur la blua ĉielo.. fekunda patrino-tero en la plena beleco.

Markantaj vizaĝoj... trajtoj sorĉallogaj... violbluaj okuloj promesas ĉielajn plezurojn, blankaj dentoj ekbrilas, ruĝa buŝo tentas, ebriiĝas de sur la kolora tolaĵo.

Ni ekhaltas. Eksidiĝas sur mola fotelo. La nomo **Julja Acker** ekflirtas antaŭ miaj okuloj.

La bildoj impresas.. surprizas.. meditigas.

„Leganto“, viro kaŝanta sian kapon inter la manoj.

La tuta persono reprezentas plenan atenton dum la legado de la malfermita antaŭ li libro, oni havas la senton aŭdi la susuron de la foliumado, la spiron de l' leganto.

„Morta naturo“: pomoj ruĝvangaj, brilŝelaj ripozadas en korbeto. Mia mano malgraŭvole etendiĝas, por ekkapti, enbuŝigi la sukoplenajn apetitigajn fruktojn.

**Julja Acker**, adeptino de nov-impressionismo.

„Disputo de Talmudistoj“... verva vicleco de la longbarbaj judoj, diskutantaj per disetenditaj brakoj pri la mistero de l' Sankta Skribo“.

Lanternoj elverŝas sian duban lumon sur vizaĝojn strattipajn, mizerajn, kadukajn, diboĉajn... larĝe malfermitaj buŝoj de ebrisanceligantaj pajlblindaj, hirtharaj noktaj papilioj, la pavimfloretoj. „Strata sceno“.

Kun naŭzo vadas la okulo tra la ŝlimo de l' malvirto, prezentita per la supra bildo.

Delikata bildo trankviligas la okulojn. „Idilio“. Benko... servistino kun fianĉo... delikate karesas la korpon de la ruĝiganta knabino la juna knabo. Sur la sama benko du sendentaj klaĉfratinoj, strabokule, kurbbuŝe, pekscivole, akralaŝe kondamnintaj junecon, amon.

„Entombigo“. Vidvino... entrempata en la senfinaj, senlimaj, kordisŝiraj mizerokaj funebro. La ruĝa, ŝvelita de multa ploro vizaĝo esprimas la grimacon de giganta, spasma vekriado... Oferto kaŝiĝas en la jupfaldoj, la etaj manoj kuntiriĝas pro timo, soleco...

Mizero de la juda vidvino, al kiu mortis la pandonanta, edzo.

Al hejmo de la talentega pentristino mi direktas la paŝojn... al pentristino plena de impresantaj, neforgeseblaj kreaĵoj....

Malfermas al mi fraŭlineto — Julja Acker. Per inteligentaj, esprimriĉaj okuloj ŝi rigardas min, petantan intervju-materialon por „Pola Esperantisto“.

Bildoj skizitaj promesas novajn ĝojojn por la ĝuavida, artsopira okulo....

Julja Acker studis ĉe Profesoro Gajewski en la Lvova Artlernejo antaŭ 6-jaroj.

Recenzoj de Lvovaj gazetoj subtenas miajn ravitajn eldirojn pri la viditaj en la ekspozicio bildoj.

Talento... al kiu oni nepre antaŭdiras brilajn sukcesojn en la estonto.

Julja Acker ekkaptas per lertaj manetoj la penikon, miksas farbojn, fiksas fidele mian vizaĝon por la ekspoziciota nova bildo „Josefine Backer“. La unua „kunsido“ finiĝis... La griza vespero ensteliĝas en la laborejon. La peniko ripozas.

Julja Acker tuŝas mian U. E. A. stelon... rigardas mian Esperanto-ĵurnalistan karton kaj ĝoje ripetas la unuan Csehlecionon... „Mi verdiĝis... kaj firme kredas, fidas al ŝlosilo de homaj koroj... al intefratiga ideo, al kara, belsona Esperanto...“ ...diras nia nova „verda“ ĉarma Lvova pentristino, samideanino..

Mi permesas al fraŭlino Acker „Polan Esperantiston“.

... Ĝis revido, kara talentega Lvovani-  
no per nia nacia gazeto“...



## TEATRO KAJ FILMO



### LA FILMO „PEER GYNT“ FARIĜOS GRANDA KAJ MULTEKOSTA.

Norvegujo ricevos ĝin — en sveda eldono.

En la norvega Esperantobladet nro 4/1934 ni trovas interesan artikolon, kiun ni ĉi-sube represas. **La Red.**

Sub ĉi tiu impona titolo kaj kur la iom ofendetema subtitolo aperis antaŭ nelonge en norvega gazeto la jena artikolo:

„La filmado de „Peer Gynt“ nun fariĝas realaĵo. Granda sveda-germana-angla-franca kompanio aĉetis la rajton de la familio de Ibsen.

La enludado komencota en julio, okazos aŭ en Berlino aŭ en Londono. Teksto kaj scenoj estas ellaborataj de eksterlandaj specialistoj, kaj oni intencas enludi la filmon en kvar diversaj lingvoj samtempe. La sveda eldono

estas destinita por ĉiuj nordaj landoj.

La bildoj estos akompanataj de la muziko de Grieg. La en libera aero okazantaj scenoj estos enludataj en Norvegujo kaj Svedujo kaj estos la samaj por ĉiuj kvar eldonoj.

„Peer Gynt“ estos la plej granda kaj la plej multekosta filmo enludita en Eŭropo.

Kiom ekscitanta tio estas por norvego! Jen unu el la plej grandaj verkoj de nia plej granda poeto prezentota al ni en la lingvo de alia nacio! Kia humiligo! Ĉu ni efektive estas tiom maldignaj? Ĉu ni estas subnormala nacio? Ĉu ni efektive havas tiom malmulte da nacia sento, tiom malmulte





## KIO ESTAS AELA?

AELA estas kooperativa laborkomuno de Aktivuloj el la Esperantistaj Libro-Amikoj.

## KIAN CELON HAVAS AELA?

AELA celas havigi al siaj kooperativanoj — membroj la necesajn bonajn librojn por ia plej malkara prezo.

## KIEL AELA ATINGAS SIAN CELON?

AELA konsistas el librokonsumantoj, kiuj ankaŭ mem produktas siajn librojn. AELA-libroj estas jam ĉe la preso kvazaŭ antaŭe aĉetitaj. Tial en la prezalkuloj ne devas troviĝi grava sumo por kovri eventualan perdon ĉe nevenditaj libroj kaj la prezo povas konsisti el la nuraj preskostoj, papero, sendkostoj, aŭtoraj honorarioj kaj malgrandaj administraj kostoj. Ricevante la necesan kapitalon jam antaŭe de la membroj mem, AELA ne bezonas pagi rentumon por kredito kaj profiton por posedantoj. AELA, dependante nur de la membroj presigas siajn librojn kie la preskostoj estas plej malaltaj. AELA produktante ĉefe por la membroj ne bezonas perantojn inter la produktantoj kaj konsumantoj kaj ankaŭ per tio ŝparas gravajn kostojn. Jen pro kiuj motivoj AELA povas malaltigi la prezon de siaj libroj por la membroj al preskaŭ la kvarono de la kutimaj prezoj.

## PRI KIO DIFERENCAS AELA ANKORAŬ DE ALIAJ ELDONEJOJ?

La membroj mem elektas la librojn, eldonotajn en la sekva jaro el tuta listo de diversaj libroj. Per tio direktas la evoluon de nia literaturo ne la konsideroj kaj preferoj de iuj eldonejoj, sed la vasta leganta kaj konsumanta amaso mem. Tiel AELA povas aperigi en nia lingvo ne nur librojn de facilaj romanoj, sed ankaŭ instruajn, kulturajn, artajn kaj poeziajn verkojn, kiujn eldonejo bazita sur individua risiko ne kuraĝus eldoni.

## KIAJN AVANTAGOJN GUAS ESPERANTISTO, ALIGANTA AL AELA?

Li ricevas la tiujaran kolekton de AELA-libroj por la tre malalta kotizo, ricevas la pasintjarajn kolektojn duonpreze, ricevas opajn librojn per rabato de 40%, ricevas senpage la gravan gazeton: LINGVO, LIBRO; rajtas elekti la serion abonatan kaj la librojn de la sekva jaro.

## KIAJN LIBROJN ELDONOS AELA EN 1935-a JARO:

### Serio A

### LINGVA

En tiu ĉi serio ni donas 1200 paĝojn de tri gravaj verkoj.

#### NOVA KRESTOMATIO. Verkis Dr. K. Kalocsay, Dr. E. Pfeffer

480 paĝoj 20×13.5 cm. Prezo: broŝ. svfr. 6.30 plus 10%. Bindo 1.50 svfr.

Daŭrigo de la Fundamenta Krestomatio, prezentanta per valorega apenaŭ akirebla materialo la literaturan evoluon inter 1905 kaj 1930. Same kiel la Enciklopedio, nepre necesa por ĉiu vera esperantisto: ĝi estas ja samtempe lingvo- kaj literaturo-historio, stilmodelo, legolibro kaj literaturo.

#### PLENA GRAMATIKO DE ESPERANTO. VORTO KAJ FRAZO

K. Kalocsay, G. Waringhien

412—550 paĝoj 20×13.5 cm. Prezo: broŝ. 5.60—7.60 svfr. (Depende de la amplekso.) Bindo 1.50 svfr.

Jen la unua vere kompleta E-a gramatiko, okupiĝanta detale kaj ĝisfunde ankaŭ pri ĉiu parto de la sintakso. Multlingva franco kaj multlingva hungaro ĝin faris, kio garantias la plenan interlingvecon de la vidpunktoj. Ĉiu nuanco stila ricevas tie sian E-an ekvivalenton: ne per novkreo sed per sagaca trovemo. Eksterordinare grava verko, signifa por la tuta evoluo de la E-a stilo.

#### NORMLINGVO POR ELEKTROTEKNIKO

Eugen Wüster. Tradukis E. Pfeffer

200 paĝoj 20×13.5 cm. Prezo: broŝ. svfr. 3.— plus 10% Bindo 1.50 svfr,

Malgranda eldono de la fama germanlingva verko de Wüster. Riĉega libro traktanta ĉiujn problemojn de la lingvo teknika, samtempe donanta profundan enrigardon en la vortstrukturon de diversaj lingvoj kaj de Esperanto, kies taŭgecon por internacie teknika lingvo la aŭtoro evidentigas nerefuteble. (Parenteze: la sama germana eldono kostas 9.— markojn)

Se tiuj ĉi libroj en formato 20×13.5 cm. ne atingas la bezonatan paĝonombon kiel kvaran ni aldonos *Evoluo de Esperanto*, de Petro Stojan.

## **Serio B**

## **ARTA-SCIENCA**

### **EDMOND PRIVAT: INTERPOPOLA PACO**

ĉ. 200 paĝoj 20×13.5 cm. Prezo: broŝ. svfr. 3.— plus sendkosto, Bindo 1.50 svfr.

Ne necesas aparte prezenti al la E-a publiko E. Privat, la stiliston kaj pensulon. La klara lingvaĵo kaj klara pensogvido brilas en sia plena pompo en tiu ĉi porpaca verko, kiu samtempe prezentas interesajn kulis-sekretojn el la laboro de la Ligo de Nacioj.

### **ANTAL HEKLER: ARTHISTORIO II. Tradukis K. Kalocsay**

180 paĝoj + 112 bildopaĝoj. 23×15.5 cm. Prezo: broŝ. svfr. 10.— plus sendkosto. Bindo 1.50 svfr.

Post la grandsukcesa unua volumo ni ne devas aparte konatigi ĝian daŭrigon, kiu pritraktas la historion de arto de la renesanco ĝis Picasso kaj la moderna arkitekturo. La verko, la sola arthistorio en Esperanto, instruas kaj propagandas samtempe.

### **VAN LOON: RIGARDU LA TERON Tradukis G. Saville**

480 paĝoj, 125 enpaĝaj ilustraĵoj; 12 unukoloraj bildoj; 18 plurkoloraj bildoj 23×15.5 cm. Prezo: broŝ. svfr. 11.— + sendkosto. Bindo 1.50 svfr.

Eble la esperantistoj havas la plej grandan intereson pri geografio, ĉar ili ja certe deziras koni la landojn, en kiuj ili havas amikojn. Gravan mankon do kompensas la traduko de tiu ĉi verko grandsukcesa, aperinta jam en 20 lingvoj. Ĝi ne estas seka sciencaĵo, sed donas la abundajn konojn kvazaŭ senrimarke, en formo de sprita babilado. Apartan valoron havas la primitivaj, sed spritaj kaj ege instruaj desegnoj. La libro estas simila luda instruilo, kiel tiu de Aisberg pri la radio.

## **Serio C**

## **BELETRISTIKA**

### **JEROME K. JEROME: TRI HOMOJ EN BOATO**

El la angla: G. Badash

240 paĝoj 20×13.5 cm. Prezo: broŝ. svfr. 4.— + 10%. Bindo 1.50 svfr.

Unika libro de bonhumoro. La leganto ne ĉesas plej bonguste ridi pri la tri ĉeffiguroj »por ne paroli pri la hundo«. La tradukanton bone konas la legantoj de Literatura Mondo.

### **AXEL MUNTHE: ROMANO DE SAN MICHELE**

El la germana: Jenny Walaminsky

550 paĝoj 20×13.5 cm. Prezo: broŝ. svfr. 10.— + 10%. Bindo 1.50.

La granda homkono, la supera arto kaj grandioza sento de humoro de verkisto unuigas en la aŭtoro. Li tiras nin kun si nerezisteble tra ridaj kaj larmaj scenoj, el sub lia sorĉo ne estas eble liberiĝi. Vera internaciulo: svedo, parizano, nun vivanta blindiĝinte inter siaj-karaj birdoj sur la insulo Capri. Sian verkon li verkis en tri lingvoj. E-o nepre devas posedi ĉi tiun libron.

### **STEFAN ZWEIG: AMOK El la germana: I. Lejzerowicz**

88 paĝoj 20×13.5 cm. Prezo: broŝ. svfr. 1.40 + sendkosto. Bindo 1.50 svfr. Ĉi tiu eterne bela novelo restas neforgeseble en la memoro de ĉiu leginto.

### **I. LEJZEROWICZ: EL LA VERDA BIBLIO KAJ**

**BABILADO DE HORACO SERCER**

100 pĝ. + 25 bildopaĝoj 15.5×11.5. Prezo: broŝ svfr. 2.20 + 10% Bindo 1.50.

La delonge anoncita libro fine pretiĝis, kaj, ilustrita de R. Laval, ĝi estas bonega distribo de vintraj grupvesperoj. Jen nia movado en kurba spegulo. La rido ne nur sanigas, sed ankaŭ instruas.

## ORIGINALA ROMANO

ĉ. 400 paĝoj. Proksimuma prezo: broŝ. svfr. 6.50 + sendkostoj. Bindo por du volumoj 3.— svfr. Por tri vol. svfr. 4.50.

De iu el la verkistoj: Szilágyi, Weinhengst, Vera Gutman, G. Saville. La verkoj estas parte sub ellaboro, parte sub kontrolo, do provizore ne estas decidite, kiuj du aŭ tri (laŭ la amplekso) estos el ili eldonitaj. Ni esperas, ke vi estos kontentaj pri la elekto, farota faksperite kaj konsciencie.

### Kiom estas la kotizo al AELA en 1935.

1. Prezoj en svisaj frankoj.

1. Kotizo por la lingva serio:

7:— se pagata ĝis la 1-a de februaro  
8:50 se pagata ĝis la 1-a de julio  
10:— se pagata ĝis la 1-a de decembro.  
Por tiu kotizo la membro ricevas la plenan lingvan serion.

3. Kotizo por ĉiuj tri kune:

25:— se pagata ĝis la 1-a de februaro  
27:50 se pagata ĝis la 1-a de julio  
30:— se pagata ĝis la 1-a de decembro.  
Por tiu kotizo la membro ricevas ĉiujn tri seriojn.

2. Kotizo por la arto-sciencia aŭ beletristika serio:

10:— se pagata ĝis la 1-a de februaro  
11:— se pagata ĝis la 1-a de julio  
12:— se pagata ĝis la 1-a de decembro.  
Por tiu kotizo la membro rajtas elekti unu el la du serioj. La du serioj kune kostas svfr. 18.50; 20.—; 22.—; laŭ la tempo de la pago.

Ci kotizoj validas por libroj broŝuritaĵoj kun simpla (senregistra) sendo. La librojn de la serioj ŝanĝi je aliaj libroj la membro ne rajtas. Libroj de diversaj serioj ne estas mikseblaj.

Kion atenti ankoraŭ ĉe la pago?

1. Estas haveblaj ankaŭ serioj kun malmola bindo. Tia bindo kostas po 0.90 svfr. pagotajn por ĉiu libro samtempe kun la kotizo.

2. Kostoj por registrita sendo (en kiu okazo AELA garantias kontraŭ perdiĝo) kostas po 0.50 svfr. por ĉiu aparta volumo.

3. La kotizo estas pagebla ankaŭ en partoj plej malfrue 1-an de decembro 1935. Minimuma partopago 3.— svfr. La tempo de la lasta partopago fiksas la sumon de la kotizo laŭ la supra tabelo.

Kelkaj pluaj informoj pri la membreco:

La akcepto de kotizoj por 1935 estos fermata la 1-an de decembro.

La membreco ekvalidas post la ricevo de la unua partopago aŭ pago de plena kotizo, post sendo de la plena adreso kaj elekto de la serio, kaj finiĝas aŭtomate post la ricevo de la abonitaj libroj.

La libroj aperas sinsekve inter la tempo 1-a de februaro kaj 31-a de decembro 1935. Aperon de iu el la libroj AELA anoncas per la senpaga kvaronjara gazeto LINGVO-LIBRO.

Se sufiĉe da demandoj, AELA presas librojn ankaŭ sur speciale luksa papero kun luksa bindo. Specialajn kondiĉojn pri tio petu aparte.

### Kion donas AELA por specialaj prezoj al la membroj?

Ĉi membro rajtas aĉeti ĉiun libron eldonitan de la eldonejo (do ankaŭ libron el alia samjara serio) kun rabato de 40%. Sed el ĉiu libro oni povas aĉeti nur po unu ekzempleron. Ankaŭ kelkdekoj da aliaj libroj, eldonitaj de fremdaj eldonejoj estas haveblaj por tia favora prezo; pri ilia listo demandu la administracion, la liston de la propraj eldonoj vidu sube:

	Ordinara prezo Afrankite	Prezo por AELA-anoj Afrankite
J. Baghy: Dancu Marionetoj	3.75	2.25
J. Baghy: Viktimoj	5.50	3.30
J. Baghy: Preter la Vivo	2.20	1.30
Kalocsay: Lingvo, Stilo, Formo	1.65	1.—
» „ Streĉita Kordo	4.40	2.65
» „ Rimportretoj	2.20	1.30
» „ Eterna Bukedo	9.90	5.95
» „ Madách Tragedio de l' Homo	4.40	2.65
» „ Goethe, Romaj Elegioj,	2.20	1.30
Kalocsay—Waringhien: Parnasa Gvidlibro	4.—	2.40
Forge: Mr. Tot aĉetas mil okulojn	4.40	2.65

	Ordinara Prezo Afrankite	Prezo por AELA-anoj Afrankite
<b>Szilágyi:</b> Trans la Fabeloceano	3.30	2.—
<b>Genthon:</b> Pentroarto en malnova Hungarujo. Duontole bind. 12.—, 7.20; broŝurita 10.—, 6.— duonlede bind.	17.—	10.20
<b>Totsche:</b> De Paĝo al Paĝo	2.75	1.65
<b>Engholm:</b> Homoj sur la Tero	4.—	2.40
<b>Kalocsay—Pfeffer:</b> Nova Krestomatio	6.95	4.15
<b>Kalocsay—Waringhien:</b> Plena gramatiko kaj sintakso de Esperanto	?	?
<b>Eugen Wüster:</b> Normlingvo por Elektrotekniko	3.10	1.85
<b>Stojan:</b> Evoluo de Esperanto	2.30	1.40
<b>E. Privat:</b> Interpopola paco	3.30	2.—
<b>Hekler—Kalocsay:</b> Arthistorio II	11.—	6.60
<b>Van Loon—Saville:</b> Rigardu la Teron	12.10	7.25
<b>J. K. Jerome—Badash:</b> Tri homoj en boato	5.70	3.40
<b>Axel Muntne—J. Weleminsky:</b> Romano de San Michele	11.—	6.60
<b>Stefan Zweig—Lejzerowicz:</b> Amok	1.55	0.95
<b>Lejzerowicz:</b> El la Verda Biblio kaj Babiladoj de Horaĉo Serĉer	2.75	1.65
<b>B. Mussolini—K. Kalocsay:</b> Vivo de Arnaldo	1.55	0.95
<b>R. M. Rilke—A. Münz:</b> Leteroj al Juna Poeto, (nur bindita)	1.65	1.—

### ***AELA-serio 1933.***

<b>Redaktis Kalocsay:</b> Hungara Antologio	13.20	7.90
<b>Grenkamp—Brzekowski:</b> Pri l' Moderna Arto	7.70	4.60
<b>Dante—Kalocsay:</b> Infero	9.70	5.80
<b>Asch—Lejzerowicz:</b> La Sorĉistino el Kastilio	3.85	2.30
<b>Enciklopedio de Esperanto I—II</b>	33.—	19.80
	<b>67.45</b>	<b>40.40</b>

La kvin supraĵ verkoj KUNE broŝ.  
binditaj

33.50  
38.50

### ***AELA-serio 1934.***

<b>Weinhengst:</b> Turstrato 4	4.—	2.40
<b>Hekler—Kalocsay:</b> Arthistorio I	14.30	8.60
<b>Jeluŝiĉ—Rotkviĉ:</b> Cezaro	9.90	5.90
<b>Engholm:</b> Infanoj en Torento	2.20	1.30
<b>Slonimski—Grenkamp:</b> Mia Vojaĝo en Sovetio	3.—	1.80
<b>Cehoslovaka Antologio</b>	13.20	7.90
<b>Redaktis Kalocsay:</b> Dekdu Poetoj	2.75	1.65
<b>Adamson:</b> Auli	1.80	1.10
<b>Aisberg:</b> Fine mi komprenas la Radion	4.95	3.—
<b>Sturmer:</b> El la Notlibro de Praktika Esperantisto	2.75	1.65
<b>Karinthy—Totsche:</b> Vojaĝo en Faremidon	1.20	0.70
<b>Kikuĉi:</b> Amo de Toojuuroo	1.20	0.70
<b>Herzi—Selzer:</b> La juda ŝtato	3.—	1.80
<b>Mussolini:</b> Vivo de Arnaldo	1.55	0.95
	<b>65.80</b>	<b>39.45</b>

Dekdu el la dekkvar libroj binditaj  
La dekkvar supraĵ verkoj KUNE broŝ.

33.—  
43.—

Prezoj kun simpla sendkosto kaj broŝurite. Por ĉiu bindo estas pago aparte 0.90 svfr. por ĉiu rekomendo po 0.50 svfr.

Leginte tiujn informojn, kion vi faros nun?

**Mi rapidos por sendi mian kotison kaj mendon antaŭ februaro al**

Halina Weinstein, Warszawa, Leszno 99. m. 5. PKO Nr. 27.867,  
1 sv. fr. egalas 1.73 zł.

da fiereco, tiom malmulte da memkritiko, ke ni tuj akceptas tiujn pece-tojn, kiujn aliaj nacioj favore kaj kom-pateme disŝutas ĉe ni? Ĉu la norvega popolo estos senpasia rigardanto de tio, ke la verko de nia granda dramisto estas anektata de fremdaj nacioj?

En Germanujo oni postulas, ke la filmo estu enludata germane, en Anglujo angle, en Francujo france, kaj en Svedujo svede. Sed ĉi tie ĉe ni — la posedantoj de Ibsen, la posedantoj de „Peer Gynt“ — ĉe ni la filmo estos prezentata en lingvo de fremda nacio! Ĉu estas sistemo en tio? Ĉu estas eĉ plej malgranda eto da racio en ĝi? — Kiom do Ibsen nepre estas prava, dirinte tiujn amare verajn vortojn: „Pripensi tion, deziri tion; ankaŭ voli tion; sed fari ĝin! Ne...“

La filmo estos la plej granda enludita en Eŭropo. Jes, certe. Tre bone, ke la plej granda filmo de Eŭropo estas produktajo de norvega poezia verko. — tio pruvas, ke ni malgrandnacionoj rajtas esti enkalkulitaj. Ĝis tiu punkto estas al ni triumfo, ke la grandnacionoj unufoje vidis filmon, kiu donas efektive spiritan profiton, kontraste al tiuj sentimentalaj banalaĵoj, kiujn ili ĝis nun havis prezentablaj. Sed tiun triumfon ne kompensas tiu al ni hontiga afero, ke „Peer Gynt“ en Norvegujo estos ludata en la lingvo de alia nacio.

La filmo estos la plej multekosta enludita en Eŭropo. Jes, tute nature rezultas tio, kiam la temo estos filmata en 4 — kvar — diversaj lingvoj kaj kun diversaj „steloj“ en ĉiuj ĉefaj roloj. Sed tio tute ne estas necesita, Kiom pli simple estus filmi „Peer Gynt“ en unu lingvo! Sed en kiu? Jen la nodo en la ŝnuro.

Se temus pri iu nacia lingvo, tiu

kompreneble devus esti la norvega. Sed tion la eksterlandanoj ne volas! Kaj ni, Norvegoj, ne povas enludi „Peer Gynt“ per filmo nur por ni mem. Ĉu do la angla lingvo? Ne, tiam Francujo kaj Germanujo rifuzos la filmon. Kaj ekestus simila situacio, se la enludado estus farota nur en la franca lingvo aŭ nur en la germana.

Kaj tie oni do staras embarasite. Sed tamen oni havas la rimedon tuj proksime — Esperanton! „Peer Gynt“ kompreneble devus esti enludata nur en unu lingvo, kaj tiam ne povos temi pri iu alia ol Esperanto. Ĉar Esperanto estas neŭtrala. Al neniu estos hontigo la prezentado de filmo en Esperanto.

\* \* \*

Estas bedaŭrinde, ke „la alia nacio“ ĉi-tiufoje estas Svedujo, dum la sveda ja estas tiu fremda nacilingvo, kiun oni ĉe ni preferas aŭdi. Sed niaj amikoj trans Kjoelen sendube komprenas, ke ni per nia hodiaŭa artikolo ne aludas iun nacion aparte, sed nur deziras atentigi pri la principo.

\* \* \*

Je nia granda ĝojo ni vidas, ke ĉiuokaze unu norvega gazeto riproĉis la aferon „Peer Gynt“ nome „Dagbladet“. Sed la afero devus esti pridiskutata en la tuta norvega gazetaro. Ĉar ĉi tie ni staras kontraŭ io ne malpli ol anekso de nia granda poeto.

Laŭ „Dagbladet“ ŝajnas, ke la filmcentraloj de la komunumoj ne volas okupi sin pri la eksterlanda „Peer Gynt“, kaj ni esperas, ke senescepte ĉiu kinoposedanto en nia lando havas sufiĉe da patriotismo kaj kuraĝa sintenado por rilati al tiu afero sammaniere.

Aŭ kion vi opinias, ke oni dirus en Anglujo, se Shakespeare estus tie film-ludata en franca lingvo?!

---

## NOVAĴOJ EL ESPERANTUJO

---

**Foiroj uzas Esperanton.** Komercaj Foiroj en Marseille, Reichenberg kaj Rio de Janeiro eldonis lastatempe diversajn varbprospektojn en Esperanto.

**Esperantigita Hago.** En Hago okazis antaŭ kelkaj semajnoj granda propaĝandvespero, dum kiu parols s-ro urbestro kaj Direktoro de Nederlanda Poŝto, Telefono kaj Telegrafo — ambaŭ Esperantistoj! Memkompreneble la vespero havis grandan sukceson.

**Esperantista Poŝta Stampo.** Brazila Poŝto uzas nun oficialan stampon kun jena esperantlingva teksto: Rio de Janeiro, turisma urbo.

**Trijar-plano de B. E. A.** Brita Esperanto - Asocio okaze de 50-jara datreveno de la ekesto de Esperanto, preparas specialan tri-jar-planon tre interesan kaj imitindan. Inter aliaj, B. E. A. volas fondi E. — Doman.

**27-a Universala Kongreso en Roma.**



Nia 27-a Kongreso okazos 3—10—17 de aŭgusto 1935 en Roma parte, parte en Napoli. Kotizoj ĝis 31. I. 1935 — 70 liroj, familianoj 42, junuloj 28 liroj. Poste 100, 60, 40 liroj. — Jam ĝis nun aliĝas 70 samideanoj!

**Lernolibro de Ido por... Esperantistoj.** Germana Ido - Asocio (!) eldonis ĵus tian lernolibron kaj ankaŭ vortaron Esperanto - idan. Ni atendas nun lernolibron de Ido por Volapük'istoj kaj vortaron Ido-Basic English.

**Poczta** (organo de Pola Poŝto — Telefono kaj Telegrafo) enhavas en nro 10 sciigon pri speciala poŝta numero de „Esperanto por ĉiuj“, kun rimarko, ke ĉiu pola poŝtisto povas ricevi tiun numeron senpage ĉe la redakcio.

„**Mondo - Filmo**“ estas nomo de akcia societo, ĵus fondita en Stockholm, kiu havas la celon produkti esperantlingvajn filmojn.

**I Nacia Kongreso de Nederlandaj Esperantistoj Katolikaj** okazis en 's-Hertogenbosch la 15—17 de aŭgusto 1934.

**Florekspozicio „Flora“** okazos en Heemstede (Nederlando) de 15 marto — 19 majo 1935. Okaze de tio la aranĝantoj eldonis belan esperantlingvan prospekton.

**Du Socialistaj Esperanto - Kongresoj.** La 3—8 de aŭgusto okazis en Valencio (Hispanujo) la 14-a Kongreso de SAT kun 376 partoprenantoj el 13 landoj. La solena malfermo okazis antaŭ 1000 personoj en la Universitato Dum la Kongreso oni inaŭguris Zamenhofstraton.

La 12—15 de aŭgusto okazis en Lille (Francujo) Konferenco de IPE (Internacio de Proletaj Esperantistoj) kun 73 partoprenantoj el 9 landoj.

**Dum Brita Radia Korporacio malfavora...** Kvankam antaŭ eĉ dek jaroj disendiĝis el da Londona Centro kelkaj esperantaĵoj, tamen lasttempe ĉiu klopodo interesigi la Korporacion pri

nia lingvo malsukcesis. Ĝia nuna sinteno estas denove klare montrata per la jena letero de la Korporacio al membro de B. E. A., kiu estis citinta la ciferojn de Esp. dissendoj en 1933 kaj sugestinta E. prelegojn pri Anglujo kaj angla vivo. „Ni bedaŭras, ke ni ne povas plenumi vian peton. La tempo disponebla por alilingvaj dissendoj estas jam limigita, kaj ĉiuokaze estas nia principo preferi lingvojn, kiuj havas nacian fundamenton“. Tial oni ne kulpigu la britajn Esperantistoj pri daŭra malfavoro de B. R. K. al nia lingvo.

...La aliaj estas tre favoraj. Konata jam estas la sukceso en „Pola Radio“. — Konataj estas ankaŭ la dissendoj de Radio-journal Brno, kiu jam ricevis de siaj aŭskultantoj honoran titolon de „Verda Stacio“. Tiu ĉi stacio dissendas ĉiumonate „esperantan horetan“ kaj krom tio, samtempe kun Praha II, Košice kaj Moravska Ostrava — ĉiumarde kaj ĉiumerkrede esp. kurson. — Ankaŭ en Estona Radio, krom ĉiusemajna kroniko pri Estonio, okazos duonhoraj paroladoj ĉiun trian dimanĉon de la monato.

„**Artikoloj kaj novaĵoj eŭropaj en Esperanto**“. Grandajn afiŝojn kun tiaj vertoj oni novas vidi ĉe stratanguloj en Londono. Nome la semajna ĵurnalo „European Herald“ aldonis lasttempe Esperanton al la lingvoj angla, germana, franca, hispana kaj itala. „European Herald“ estas vendata preskaŭ en ĉiuj landoj.

**Katholische Radio Gids**, granda semajna nederlanda ĵurnalo depost 6 de novembro enhavos esp.-rubrikon kun E. programoj. Al la redakcio ni sendas gratulojn kaj samtempe dankon pro la sendo de Esp. programo.

Regiona Esp-ista Ligo en Ĉeĥa Teŝin sub prezido de s-ro L. Krvsta sole ne inaŭguris la 4. XI. 1934. Esperanto-Memorŝtonon en urba parko de Novy Bohumin.

## PREMJA NA ROK 1935!

Každy wpłacający pełny roczny abonament „Pola Esperantisto“ na rok 1935, do dnia 31. stycznia 1935, otrzyma jako bezpłatną premję miesięcznik „Ondo de Daŭgava“ lub „Informoj de Estonio“ (wedle wyboru) przez cały rok 1935. Pozatem przysługuje premjowanemu prawo zaabonowania jednego z tych miesięczników po cenie ulgowej zł. 1.50 rocznie.

Aliĝu tuj por 1935 al  
**UNIVERSALA ESPERANTO - ASOCIO.**  
Petu aliĝilojn, detalojn kaj specimenojn de „Esperanto“ de lokaj Delegitoj aŭ rekte de  
**Ĉefdelegito J. Ŝapiro,**  
**Marsz. Piłsudskiego 33, Białystok.**

Abonujcie miesięcznik „Ondo de Daŭgava“ i „Informoj de Estonio“ w cenie zł. 2.20 rocznie. Abonament przyjmuje admin. „Pola Esperantisto“. Konto P. K. O. 406.660.

## RECENZOJ.

**Wacław Sieroszewski: Marŝalo Józef Piłsudski.** Biografio. Kun permeso de l' aŭtoro tradukis kaj komentariis Mgr. Fil. B. Strelczyk. Paĝoj 53, formato 15x21. Eldonis Pola Esperanto-Asocio, Warszawa, 1934. Prezo zł. 1.— plus sedkosto.

La aŭtoro, Wacław Sieroszewski, prezidanto de Pola Akademio Literatura, tre interese skizis la vivon kaj laboron de Józef Piłsudski, kaj tiun ĉi valoran libron tradukis esperanten s-ro Strelczyk. Eldonis ĝin P. E. A. Kaj jen la veron pri la Marŝalo Piłsudski, pri liaj senlacaj penoj por sendependeco de Polujo povas jam legi esperantistaro de la tuta mondo.

La libron, kiu havas tre estetikan aspekton, belan kovrilon, bonkvalitan paperon, klaran preson, ornamas portreto de la Marŝalo.

Jes, la traduko de la libro estas bona, tamen enŝteliĝis iom da malperfektaĵoj, kiujn mi almenaŭ parte provos riparoli.

La tradukinto tute prave skribis ĉiujn familiajn nomojn tiel, kiel ili efektive estas skribataj, sed en parantezoj li estis devinta prezenti ilian elparolon. Kiu eksterlandano elparolos ĝuste: Daszyński, Rymkiewicz, Łukasiewicz, Świerzyński ktp.? La samo koncernas geografiajn nomojn ekz. Cieszyn, Chęciny, Brzeziny, Krzeszowice ktp.

Speciale koncerne geografiajn nomojn regas en la libro ĥaoso.

Mi legas: en Kraków (p. 13, 19, 21 k. a.), Warszawa (multloke), Warszawa'n (p. 35), al Łódź (p. 13), en Lwów (p. 17, 32), Dęblin (p. 27), en Wilno (p. 7 k. a.). Kial Warszawa skribita per **W** kaj Vilno per **V**?

Krome mi vidas: Vilna regiono (p. 5), Wilna vojevodujo (p. 48 kaj 49), Wilna distrikto (p. 50), Varsovia Citadelo (p. 13), varsovia palaco (p. 52), Krakov'a parolado (p. 27).

Se ne estas ĉi tie uzata esperanta formo **Varsovio**, ne devas esti adjektivo **varsovia**, sed **Warszawa'a**. (Kio cetere ne plaĉas al mi kaj tute ne estas uzata).

Tamen, trafoliumante la libron, mi trovas esperantigitajn nomojn: Krakovon (p. 14), al Londono (p. 13), en Vieno (p. 15), en Parizo (p. 21, 24), en Magdeburgo, en Magdeburgon (p. 27) kaj... el Magdeburg (p. 51).

Se povas esti Londono, Vieno, Parizo, kial ĉefurbo de Polujo ne estas Varsovio, sed Warszawa?\*)

Estas ankaŭ: el Petersburg (p. 8), Petersburg'a socialismo, Petersburg'on (p. 9) kaj "... dum la Germanoj preparis „duan Marnon“... (p. 27). Mi rimarkigas, ke en la franca lingvo la nomo de tiu ĉi rivero estas Marne, ne Marno.

Kial: Vilno'n kaj Tokio'n (p. 9, 15), kaj ne simple Vilnon kaj Tokion? Al la vorto Żmudź (p. 6) estas klarigo sur p. 48, ke litove: Zamaitis....., sed mankas esperanta nomo: Samogitujo (Grabowski).

Koncerne mallongigojn de diversaj politikaj partioj kiel: S. U. K. R. (Senpartia Unuiĝo por Kunlaboro kun la Registaro, pole: B. B. W. R.), P. S. D. P. (Pola Social - Demokrata Partio, pole: Polska Partja Socjal.-Demokratyczna), P. P. S. (Pola Socialista Partio, pole: Polska Partja Socjalistyczna — P. P. S.) — bone faris la tradukinto, uzante ia esperantajn mallongigojn, sed kial Pola Militistara Organizaĵo (pole Polska Organizacja Wojskowa) havas polan mallongigon P. O. W. anstataŭ P. M. O.? Moraczewski estas P. S. P.-ano (laŭ la esperanta mallongigo) ne P. P. S.-ano (p. 51).

En la nomo **Pola Esperanto-Asocio** estas forlasita la streketo inter la du lastaj vortoj, Kial?

Strange estas, ke tiel bona esperantisto, kiel s-ro Strelczyk, uzas latinan vorton **ibidem** anstataŭ esperanta: samloke.

Kial la titolo de libro de Piłsudski: (p. 5) „Pisma — Mowy — Rozkazy“ ne estas tradukita?

En la libro troviĝas iom da esprimoj, je kiuj mi ne povas konsenti, kaj iom da preseraroj, sed mi esperas, ke en la dua eldono ili estas forigitaj. Preseraroj, sed mi esperas, ke en la dua eldono ili estos forigitaj. Sed jam sufiĉe!

Malgraŭ tiuj ĉi malperfektaĵoj mi tra legis la tutan libron kun granda intereso kaj plezuro, kaj mi povas diri, ke s-ro Strelczyk bone ĝin tradukis.

Kaj efektive bonan ideon havis P.E.A. eldoninte la libron de Sieroszewski pri Marŝalo Piłsudski.

Ni atendas novajn eldonaĵojn.

**Halina Weinstein.**

\*) Sed kial Varsovio, kaj ne Varŝavo? Ekz. en la pola lingvo la germana urbo Dresden estas nomata Drezno — do tute Esperante laŭforme. Tamen neniu esperantisto uzus tiun fremdan formon, kiel nomon de tiu ĉi urbo. Analoge: kial

ni uzu la latina-francan formon „Varsovio“ se ni posedas pli racian kaj ĉie bone kompreneblan formon „Varŝavo“?

### La Red.

Ni eksciis pri fondo de nova monata Esp.-revuo en Ĉinujo: **Kantona Esperanto-gazeto**. (P. O. Box 88, Canton, China). Koran gratulon al ĝi! La redakcio de tiu gazeto petas pri kunlaboro. Dezirataj bonstilaj artikoloj pri Esp.-movado kaj diversaj interesaj temoj.

**Raporto de la aerologia observatorio de Tatenō**, N-o 9. Jarlibro por 1931. Eldonita de la Aerologia Observatorio, Tatenō apud Tutiura (Ibaraki-ken), Japanujo, 1934, 214 paĝoj.

En antaŭparolo la direktoro de l' observatorio, s-ro W. Oishi, mencias, ke en pasintaj jaroj jam aperis 8 raportoj (mi dirus raporteĝoj) kun diversaj enhavoj. Ĉiuj klarigoj al la multegaj nombroj, nombraroj, ciferoj, tabeloj k. t. p. estas prezentitaj en Esp. Pure scienca presaĵo povas servi kiel okulfrapa dokumento, konvinkilo, ke Esp. estas ĝenerale tre necesa kaj tre utila. kaj precipe en tiuspecaj eldonaĵoj. Estus ege prudente kaj praktike, se ĉiuj observatorioj sekvus la imitindan ekzemplon de la observatorio en Tatenō.

**L' Esperantiste Sisteronnais** reprenis en novembra n-ro tutan nian alvokon kaj la programon pri Esp.-radio-prelegoj. Koran dankon!

**Ondo de Daŭgava** enhavas en oktobra n-ro 1934 rakonton de A. Niemojewski: „La vento“ esperantigitan de Judith Krievs.

**Kial Norda Gazeto** ne bonvolis enpreni nian radioprogramon en novembra n-ro, kvankam ni sendis ĝin kun afabla peto, kaj la gazeto aperigis alilandajn Esp.-programojn? Bv. helpi nin, represigante tiun el la nuna n-ro de P.E., por rezulte firmigi pozicion de Esp. en polaj r-stacioj.

**The British Esperantist** el XI 1934 en ĉefartikolo s. t. „1887—1937“ verkita de Brita Ĉefdelegito, s-ro Fred Wadham, parolas pri Varŝavo, urbo de la venonta jubilea kongreso. La tuta gazeto krom la kroniko, recenzoj kaj kelkaj anekdotoj estas verkita en la angla lingvo.

**Lyon - Touriste**, journal officiel du Syndicat d' Initiative de Lyon et de ses environs, n-ro 263, enhavas ĉefartikolon en Esp. s. t. „Pejzaĝoj de Lyon kaj de la Lyona regiono“, verkitan de s-ro André Challey. Bedaŭrinde la korekto multe lamas. La nomita sindikato (adreso: place Bellecour, Lyon, Francujo)

senpage sendas ilustritan prospekton al ĉiu petanto.

**Aganto**, literatura gazeto (adreso: 2 Kandan 3 Ĉome, Kojimaĉi, Tokio, Japanujo) enhavas nur originalajn verketojn de japanaj aŭtoroj. Interese estas, ke preskaŭ ĉiu parolas pri ia fantomo aŭ halucino. Inter ili troveblas tradukindaj rakontaj por gazeto, kiel ekzotikaĵo. Ĉu vi provos? La lingvaĝo estas bona. Ni dezirus vidi la revuan pli ampleksa.

**B. Radziński: PODRĘCZNIK JĘZYKA ESPERANTO**, wyd. II. Nakładem autora. Chełmno - Pom. Druk F. Malinowskiego. Paĝoj 64.

En 15 lecionoj prezentas la aŭtoro la gramatikon de la lingvo en tre konciza formo. — La vorto „sufikso“ estas tradukita samsignife per *w s t a w k a*, *p r z y r o s t e k* kaj *s t a w k a* (!?) anstataŭ **ununura** ne erariga gramatika termino **PRZYROSTEK**, simile „prefikso“ estas difinata kiel *p r z y s t a w e k*, *p r z y r o s t e k* kaj *p r z y s t a w k a* anstataŭ la termino nun ĝenerale uzata **PRZEDROSTEK**. Inter la afiksoj mi rimarkis „—oz—“, ne necesan en la elementa kurso. La lernolibro havigas multe da lernotaj vortoj, kiuj ebligas facilan esprimovon. La dua parto de la libreto enhavas kelkajn legaĵojn kaj preĝojn, pro tio la lernolibro estas speciale aplikinda en katolikaj rondoj. Sur la listo de la preseraroj devus troviĝi ankaŭ „boii“ anst. „boji“. „Por“ ne estas *p r z e d i m e k*, sed **przyimek** (prepozicio).

**L' Esperanto**, organo de italaj Esp-istoj (Torino, Corso Palestro 6) prezentas en sia n-ro 11—12 provizoran programon de la kongresaj kaj turismaj aranĝoj. La kongreso okazas komence en Firenze (3 kaj 4 de aŭg.), poste en Roma (5, 6, 7, 8) kaj en Napoli (9 kaj 10). Post la kongreso, kvazaŭ ĝia daŭrigo, okazos la kongresa krozado al Afriko, en tagoj 11. VIII.—17. VIII. La plej malmulte-kosta bileto en tiu krozado kostas 355 L, la plej kosta 715 L. Krome, se iu aliĝos al la krozado antaŭ la 31. I. 1935, povas gajni unu milionon da liroj en la ŝtata loterio. Informas pri ĉio Esperanto-Centro Itala, Milano, Galleria Vittorio Emanuele 92.

**S-ro Carl Walter** (Berlin W 35 Graf Spee-Str. 24). deziris plifaciligi la komprenon de iĝi kaj iĝi al la lernantoj, pro tio li eldonis serion de 3 iĝi — iĝi — bildkartoj.

Kontraŭ alsendo de unu respondkupono, ricevebla en ĉiu poŝtejo li sendas al ĉiu esperantisto serion afrankite.



**Kraków.** La 26-an de X. okazis Ĝenerala Kunveno de Laborista Esp. Asocio „Tagiĝo“ (plac Matejki 4), dum kiu oni elektis ienan estraron: gvidanto: Piotrowski Albin, vicgv.: Ortsman Juljusz, sekretario: Perlmutter Natan, kasisto: Schlang Hirsz, estraranoj: Fijał Jakób, Hradilowa Anna, Kornblüth Wilhelm, Ganz, Obtler Rena, Salomon Samuel.

**Lwów.** „Gazeta Poranna“ en sia n-ro 10834 de 9. XI. 1934 enpresis ampleksam mencion pri la aperinta en „Heroldo de Esp.“ raportajo de f-ino M. Mantel pri la lvova radio - stacio.

**Szamotuły.** Prof. B. Maske gvidas kurson en la Ŝtata Gimnazio. 28 partoprenantoj. La kurso konsistas el du partoj: por komencantoj kaj progresintoj, po unu horo ĉiusemajne, senpage kaj nedevige. Uzata estas lernolibro de prof. Sygnarski el Bydgoszcz. Kelkaj el la progresintoj jam korespondas kun alilandanoj.

Ni ne scias kiamaniere troviĝis sur nia skribotablo la ĉi-suba kronikajo, nun jam malnoviĝinta. Ni tamen enpresigas ĝin por konigi fondon de nova grupo. **La Red.**

**Warszawa.** La 15-an de aprilo 1934 j. okazis fondo de l' Praga Esperantista Rondo (P. E. R.) en propra ejo ĉe la strato Brzeska 18/3. P. E. R. havas la celon disvastigi Esperanton inter la Praganoj. Dum kelkaj apenaŭ monatoj la Rondo impone disvolviĝis kaj nune havas ĉirkaŭ 80 anojn, kuntirantajn ĉiam novajn anojn kaj simpatiulojn. La Estraro de l' Rondo jam bone sukcesis en la energia organizado de la Biblioteka kaj Kulturklerigada Sekcioj. Pli ol 40 anoj lernas la lingvon Esperanto. La Estraro de l' Rondo decidis plej baldaŭ organizi la Propagandan Turistan Sekcion.

**Halina Weinstein, Warszawa, str. Leszno 99, m. 5. P. K. O. Nr. 27867. Tel. 59837** akceptas abonojn por jenaj gazetoj:

**Pola Esperantisto** jare zł. 8.—; duonjare zł. 4.—; kvaronjare zł. 2.—; opa numero zł. 0.70.

**La Praktiko** jare zł. 8.—; duonjare zł. 4.—; opa numero zł. 0.70. Abona jaro komenciĝas en januaro kaj julio.

**Literatura Mondo** jare zł. 15.75; duonjare zł. 8.75; kvaronjare zł. 5.25; opa numero zł. 1.75.

**Lingvo - Libro** (kvaronjara gazeto) opa numero zł. 0.20.

**Ondo de Daŭgava** jare zł. 2.20; opa numero 0.20.

**Informoj de Esperanto - Asocio de Estonio** jare zł. 2.20; opa numero zł. 0.20.

**Esperanto dla Wszystkich** jare zł. 2.—. opa numero zł. 0.20.

Nur ĉe mendo de unuopaj numeroj aldonu por poŝtelspezoj 10 proc., minimume zł. 0.10. Aĉeteblaj ĉiuj eldonaĵoj de Pola Esperantisto, Literatura Mondo, La Praktiko k. t. p. Sendante monon bonvolu indiki la celon de la enpago. Por korespondaĵo bonvolu aldoni poŝtmarkon.

**Rimarko:** aĉetebla kaj mendebla ENCIKLOPEDIO DE ESPERANTO.

## ALVOKO.

### Karaj polaj samideaninoj!

Hodiaŭ mi turnas min al vi por atenti vin pri la ekzisto de la „Unuiĝo de Esperantistaj Virinoj“, tutmonda virina asocio, kiu estis fondata dum la Buda-pesta Esp.-Kongreso antaŭ 5-jaroj.

U. D. E. V. arigas la virinojn, kiuj, komprenante la urĝan bezonon de la tempo, volas labori per Esperanto por la Paco, kaj kiuj, konsciaj pri la paca signifo de la lingvo internacia, volas porti la lumon de la Verda Stelo al ĉiuj pacamantoj. La sentoj de malamo kaj malpaco regas la mondon kaj minacas al ĝi pereon. Ni ne povas plue silenti. Ni alten levu nian voĉon de protesto, por ke oni aŭdu en ĉiuj anguloj de la mondo, ke neniam la virina koro aprobas la teruraĵojn de l' milito kaj sango-versado!

Al la detruaj sentoj, kiuj venenas hodiaŭ la homaron, ni kontraŭmetu la solidaran fronton de niaj virinaj koroj. La taskoj de ni, virinoj, estas gravaj sur ĉi tiu kampo; kunlaboru vi ĉiuj!

La membro - jarkotizo por U. D. E. V. estas nur 2 Zł, inkluzive la monata gazeto „L' Esperantiste Sisteronnais“, kiu en ĉiu numero disponigas al ni kelkajn paĝojn. Aliĝu multnombre, karaj samideaninoj kaj elektu en ĉiu urbo lokan reprezentantinon por U. D. E. V., kiu a-

fable kolektu la kotizojn de la varbolaj membroj por sendi ilin kun la **membro-listo**, finfine aŭ al mia adreso, aŭ al la franca sekretariino S-rino Marie Borel I. Claude Bernard, Lyon.

Kun samid. salutoj

via **Bianka Haas**

Bielsko, Kolejowa 11. Pola sekretariino por U. D. E. V.

LEO BELMONT.

### NOKTURNO III.

Tag' malhela jam finiĝas,  
Sange mortas sunradi',  
Vent' la flavfoliojn ŝiras,  
De kornikoj morna kri'.

En la fundo de la koro  
Renoviĝas la dolor',  
Kaj animo ĝojon volas,  
De la amo plena kor'!

Vi forpasis orprintempo,  
Kaj ĉirkaŭe jam malvarm'...  
Kiel kanti ĝojan kanton,  
Se en ĝin miksiĝis larm'?!  
El pola lingvo tradukis  
**Halina Weinstein.**

**ĈU VI JAM FINPAGIS LA ABONON  
POR J. 1934?!**  
**SE NE**  
**PAGU TUJ JE NIA KONTO**  
**P. K. O. 406.660.**  
**RENOVIGU LA ABONON**  
**POR JARO 1935!**

### ŚWIATŁO WIEDZY, SKARBY KULTURY

uprzystępnisz analfabecie --  
nauczywszy go czytać.

Wskazówki w sprawie „Miesiąca walki z analfabetyzmem” w Polskiej Macierzy Szkolnej, Warszawa, — Krakowskie Przedmieście 7.

10% - an rabaton

okaze de

### „FESTO DE LA LIBRO“

ricevas ĝis la 31 de decembro k. j. ĉiu aĉetanto ĉe Libreja Fako de „Pola Esperantisto” Kraków, Lubicz 34. Konto P. K. O. 406.660. Postulu senpagan katalogon!

## RADIO.

Jen la statistiko (preparita de s-ro **L. Kutscher**) de la ricevitaj korespondajoj, kalkulitaj ĝis la somera libertempo 1934.

Anglujo	76
Aŭstrio	10
Belgujo	21
Bulgarujo	33
Ĉeĥoslovakujo	71
Danujo	58
Estonio	3
Finnlando	2
Francujo	310
Germanujo	138
Grekujo	1
Hispanujo	9
Hungarujo	10
Italujo	8
Jugoslavio	26
Latvio	10
Nederlando	40
Norvegujo	3
Pollando	875
Rumanujo	1
Sovetio	6
Svedujo	78
Svisujo	4
<b>kune 23 landoj —</b>	<b>1822</b>
Gratulleteroj venis el:	
Aŭstralio	1
Brazilo	1

Ni prezentas pluan programon de E-prelegoj en polaj radiostacioj (precipe Kraków kaj Warszawa).

11 XII mardo 22h45—23h. Tad. Hoda-kowski: Interparoloj kun aŭskultantoj en Esperanto.

12. XII. je la 21h okazos koncerto. Estos pianludata Chopin'a „sonato h moll” (sen Esperant-lingva anonco), tuj post ĝi je la 21h30m okazos 10 minuta prelego pri „Mazurkoj de Chopin”, verkita de prof. dro J. Reiss.

19 XII merkr. 21h30—21h40 Dir. dro Beres: Eblaĵoj de pola eksporto.

2 I merkr. 21h30—21h40 Prof. dro O. Bujwid: Pri la Esp. traduko de „Quo vadis?”

8 I mardo 22h45—23h. Tad. Hodakowski: Interparoloj kun aŭskultantoj en Esperanto.

22 I mardo 22h45—23h. Dir Bol. Walewski: Beleco de l' pola popola muziko.

31 I ĵaŭdo 22h45—23h. Prof. dro Zerndt: La lando de nigraj diamantoj (Supra Silezio).

12 II mardo 22h45—23h. Tad. Hoda-kowski: Interparoloj kun aŭskultantoj en Esperanto.



26 II mardo 22h45—23h. Dro Adam Gadomski: Polaj vojaĝistoj kaj malkovrintoj.

La 5. XII. je la 22h15m ĉiuj ĉeĥoslovakaj stacioj disaŭdigos novan, interesan „Esperanto-horeton“.

Samideanoj, bonvolu memori, ke devo de ĉiu konscia Esperanto estas subteni la Esper.-prelegojn, sendante dankskribaĵojn al **Polskie Radio, Warszawa. Ne forgesu pri tio!!**

### GRAVA ALVOKO

Multaj samideanoj jam atendas, ke la italaj radio-sendstacioj dissendos sciigojn pri la 27-a dum venontaj monatoj. Bedaŭrinde, ni devas konfesi, ke niaj klopodoj por tio ankoraŭ ne sukcesis. Ni renovigos niajn atakojn, sed nun ni bezonas helpo de niaj eksterlandaj amikoj. Estas necese are sendi leterojn, kartojn k. t. p. insiste demandante la restarigon de la esperantaj dissendoj. Deklaru, ke ankaŭ kvin minutoj po semajne kontentigos vin, diru ke vi deziras viziti la roman Kongreson venontan jaron, anoncu ke vi volas havi aktualajn informojn pri Italio k. t. p.

**KAJ SUBSKRIBU MULTNOMBRE! Adresu la leteron al DOKTORO RAF. CASERTANO, Subsekretario por la Gazetaro kaj la Propagando ROMA.**

F-ino Erica Dietz apartenas al la plej diligentaj aŭskultantoj de Esp.-prelegoj. Jen ŝia dankletero:

Strasbourg, la 16an de junio 1934.  
**Al Polskie Radio**

Esperanto-fako

**Altestimata Sinjoro Direktoro,**

Longan tempon Polskie Radjo, precipe la sendstacio de Warszawa estas la plej ŝatata de la esperantistaj aŭskultantoj pro la ĉiam interesaj prelegoj kaj la reguleco de la send-horo kaj tago. Mi mem estis feliĉa pro tio, ĉar mi povis ĉiam fidi; mi estis certa, ke la prelego okazos ĉiun duan kaj lastan merkredojn de ĉiu monato kaj ĉiam proksimume je la sama horo, prefere malfrue. Al mi persone estas pli agrable, se la prelegoj okazas malfrue, ĉar estas al mi malfacile, eĉ neeble, kiel al poŝtoficistino, reveni hejmen por povi aŭdi Esperanto-prelegon, kiu okazas, kiel estis hodiaŭ vespere, je la 20a horo 30! kaj nur 10 minutojn! Mi revenas je la 20a h. 50, vidas en la programo ĵus ricevita, ke ĵus laŭ la programo, okazis Esperanto-prelego! Kia seniluziigo! Kia ĉagreno! Vi ne povas imagi tion, ĉar al vi laŭŝajne la afero aperas eble kiel

bagatelo. Pardonu, ĝi ne estas, tute ne estas!

Se mi estas al vi senfine dankema pro ĉio, kion vi jam faris por Esperanto, mi ne ankoraŭ estas kontenta, kaj multaj esperantistoj samopinias kun mi; vi estas progresemaĵoj homoj en Polujo, mi gratulas vin pro tio. Montru tiun progresemon per reveno al via plifura sintenado rilate al Esperanto, precipe antaŭ viaj mikrofonoj. Tre serioze kaj insiste, mi petegas vin, bonvoli ree o-

kazigi regulajn Esperanto-disaŭdigojn, pli longajn kaj nepre pli malfrue ol je la 20a h. 30. Kaj mi havas ankoraŭ specialan peton al vi: kiam okazas programŝanĝoj, bonvolu esti tiom afabla kaj anoncigi tion **en Esperanto**, por ke ni ĉiuj havu la eblecon kompreni tion, kio estas dirata pri Esperanto, en pola lingvo. Mi kredas, ke tio ne estas tro granda peto, ĉar vi ja havas parolantojn, kiuj anoncas la prelegojn en Esperanto, sekve ili ankaŭ devas povi diri tion, ĉar kion utilas al ni aŭdi pole ion pri „Esperancki“ kaj ne kompreni ĝin?! Estas ja sufiĉe malfeliĉe, ke oni ne konas ĉiujn naciajn lingvojn, sed, de kiam ni havas tiun netakseblan trezoron: Esperanton, tio fakte ne plu estas necesa. Sed Esperanto devas esti pli disvastigita kaj helpi tion vi povas kaj devas. Se vi scius kiajn kaj kiom da malfacilaĵoj ni, en la poŝto, ĉe la ĝicetoj, jam havis kun Poloj, sed pli ofte kun senhelpaj, senrimedaj virinoj kun infanoj, kiuj vojaĝis el Polujo al la edzo aŭ frato, aŭ parenco, sen scipovi eĉ unu vorton el alia lingvo krom sia nacia, vi mirus eble, se mi dirus al vi, ke per tute malgranda Esperanta-Pola, Pola-Esperanta vortaro ni povis pli malpli interkompreniĝi. Sed sen mia vortareto, neniu interkompreniĝo estus estinta ebla. Ne sufiĉas, se mi scias ĝin kaj posedas vortaretojn, ĉiuj, kiuj vojaĝas al la eksterlando, devas koni la internacian mondhelolinĝvon, kaj nor atingi tion, ni petas vian helpon. Vi ja certe konas ĉiujn utilojn de Esperanto, ŝajne ne devus esti necese, ke mi rediru ilin, sed kelkfoje oni forgesas...

Cetere, volonte mi ja farus ion por rekompensi vin pro la servoj faritaj kaj ĉefe farotaj, ĉar mi scias, ke oni ŝatas kaj deziras ĝin, sed kion fari? Ĝis mi havos novajn sugestojn, mi kontentiĝas per varma danko al vi pro ĉio, kiom vi jam faris, sed samtempe petegas vin ne forgesi pripensi kaj se eble, kiel eble plej baldaŭ plenumi tiujn petojn.

Ankoraŭ foje mi rediras mian plej koran dankon kaj „antaŭan dankon“ kaj petas Sinjoron Direktoron akcepti miajn respektplenajn esperantistajn salutojn.

F-io Erica Dietz  
34, rue du St. Gothard  
**Strasbourg**  
Bas Rhin  
Francujo.

### ROZJAŚNISZ ŻYCIE, OTWORZYSZ ŚWIAT

**analfabecie — ucząc go czytać.**

Wskazówki w sprawie „Miesiąca walki z analfabetyzmem“ w Polskiej Macierzy Szkolnej, Warszawa, Krakowskie Przedmieście 7.

La 22 de decembro k. j. organizas la E-unuiĝo „Progreso“ en Nymegen (Nederlando) letervesperon. Ĉiuj leteroj kaj pkartoj estos respondataj. Skribu multnombre al: s-o Ed. van Abierlo, Nymegen. Oude Weurtscherweg 3. Nederlando.

### NOWOŚĆ!

„**Esperanto jego cel i zadanie**“. Nakładem wydawnictwa „**Juna Esperantisto**“ w Krakowie ukazała się broszura, omawiająca w poszczególnych rozdziałach rozwój ruchu międzynarodowego języka Esperanto w kraju i zagranicą. Autor w swej pracy poruszył wyczerpująco szereg zdobywszy j. Esperanto na polu **szkolnictwa, literatury, radiotelegrafii, handlu, turystyki, sportu** i t. d.

W przedmowie do tej broszury prezes „Delegacji Esperantystów w Polsce“ prof. U. J. **dr. Odo Bujwid** tak ocenia pracę:

„*Mamy tu wszystko, co może interesować polskiego czy elnika, który chce poznać światowy ruch esperanta, postępujący stale i zataczający coraz szersze kręgi po całym globie... Polecam dlatego gorąco każdemu, kto się interuje postęпами w kr. iu, przeczytać broszurę...*“

Broszura w popularnej cenie **1.— zł.** jest do nabycia we wszystkich większych księgarniach lub administracji „**Juna Esperantisto**“, **Kraków, Lelewe-la 9, m. 2. — P. K. O. 413.944.**

**PRENUMERATA:** rocznie zł. 8.—, półrocznie zł. 4.— Dla Towarzystw i grup esper. rocznie zł. 6.— Zagranicą: 5 fr. szw. Numer pojedynczy zł. 0.70. podwójny zł. 1.40.

**OGŁOSZENIA:** 1/2 strony zł. 30.— 1/4 strony zł. 15.— 1/8 strony zł. 10.— Korespondencja: małe ogłosz. z 10 słów (prócz adresu) zł. 1.—

**REDAKCJO KAJ ADMINISTRACIO: KRAKOW, LUBICZ 34.**

Ĉu vi jam legis la rakonton de

**Henryk Sienkiewicz: Orso**

trad. A. Oberrotman

**Prezo: zł. 1.10 kun afranko.**

Mendu tuj ĉe „Pola Esperantisto“  
Kraków, Lubicz 34. Konto PKO. 406.660.

Vi povas ellerni modele danci, se vi sciopovas neniom, kaj perfektigi en ĉiuj modernaj dancoj en la bonega, unuaranga danclernej

en **Varsovio, Marjańska Nr. 9/3**

Samtempe vi havas tie okazon paroli esperante, ĉar multaj esperantistoj vizitas la ejon.

**Precipe geesperantistoj gastame akceptataj!**

### GRAVA SCIIGO

#### POR KURSGVIDANTOJ!

Bonege konservitan, kompletan, antikvaran kursmaterialon laŭ Ĉe-metodo, bezonegan por kursgvidantoj havigu ĉe „Pola Esperantisto“, **Kraków, Lubicz 34.**  
Prezo zł. 17.— kun afranko.

Pollanda Esperanto-Delegitaro ĵus eksciinte, ke **Esperantista Federacio de Norda Francujo** okaze de la somera katastrofa superakvego sendis kompatesperimojn kaj kolektis la monon por la viktimoj — kortuŝite de la bonanimeco de niaj francaj samideanoj, tute dankas en la nomo de polaj Esperantistoj la **Federacion kaj speciale al s-ro prezidanto, Albéric Humez, al s-ro ing. Centneršver-sekretario kaj al s-ro René Prince-kasisto.**

### KURSY JEZYKA ESPERANTO

zamawiają tylko

**Leo Turno** — Kompletny Podręcznik j. Esperanto.

— Wyższy Kurs j. Esperanto

— Czytanki Esperanckie

— Słownik esp.-pol. i pol.-esp.

Cena każdego tomiku **1.— zł.** Nauczyciele i księgarnie otrzymują rabat.

**Skład główny: Dr. Leopold Dreher, Kraków, Starowiślna 37, PKO. 405.716.**

**ABONO:** jare zł. 8.—, duonjare zł. 4.—. Por. societoj kaj grupoj esperantistaj jare zł. 6.— Eksterlande 5 sv. fr. Aparta numero zł. 0.70 duobla zł. 1.40.

**ANONCOJ:** 1/2 paĝo zł. 30.— 1/4 paĝo zł. 15.— 1/8 paĝo zł. 10.— Korespondado: anonceto de 10 vortoj (krom adreso) zł. 1.—

**KONTO P. K. O. NR. 406.660**